



DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Abono en Eŭropo, 1992 : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF

Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS

Pĉk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

ĈU GREGIĜO MINACAS LA HOMARON ?

Homo estas dupieda mamulo, kiu estas kapabla pensi kaj paroli. Ju pli li evoluas, des pli li devus diferenciĝi de la bestoj. Ĉiu virino, ĉiu viro estas unikaĵo. Nia socio tamen nun rabotas la apartaĵojn, kiuj konsistigas unu el la riĉaĵoj de la homa speco. Iom post iom la homoj retrovas emon al gregiĝo kaj ne plu estas kapablaj disvolvi sian personecon. La kulturo pli kaj pli fariĝas objekto de amaskonsumado kaj falas en la manojn de la monaviduloj.

En ĉiuj distraj kaj kulturaj aktivaĵoj renkontiĝas bezono ŝafe retrovi sin kune kun miloj da homoj.

La muziko estas nur preteksto por festivaloj, kiuj ebligas al homamaso renkontiĝi, drinki kaj amoradi. Sporto estas spektaklo por homoj stultigitaj per televido kaj aliaj amaskomunikiloj. (La precipa celo de la sporta konkurso estas reklamado). La biciklado, kiu ebligas belegajn promenadojn laŭ idiliaj kamparaj vojoj, okazas en klubegoj, kie fanfaronas la membroj pri siaj multekostaj bicikloj. Turismo egalas al "ĉartero" kaj brunigado, ktp.

Ĉu ne estas malĝojega la konstato, ke ĉiujare milionoj da homoj multekoste adorsterniĝos en la Disnej-parko de

Marne la Vallée, tiu templo de la idioteco? Kompatinda Eŭropo, kiu montriĝas nekapabla valorigi sian kulturen riĉecon kaj plenstopas sin per hamburgeroj kun keĉapo.

En ĉio tio kie troviĝas la homa genio? Dum tiaj okazaĵoj ĉiu partoprenanto perdas sian unikecon, siajn proprajn artajn eblojn, sian emon al la kreado. Li/ŝi limiĝas siajn ambiciojn al la imitado de la aliaj. Nekonscie ili malfeliĝigas sin mem.

Ĉar estas la kreado, kiu estas fonto de ĝojo. Ĝojas la patrino kiu vestas sian infanon per pulovero, kiun ŝi mem trikis. Ĝojas la ĝardenisto, kiu manĝas siajn terpomojn. Ĝojas la esperantisto, kiu deklamas sian propran poemon; unuvorte ĝojas tiu, kiu ion kreas.

La laborkondiĉoj ne plu permesas al la homo disvolvi siajn kreaĵojn eblojn. Kian ĝojon povas trovi en la laborejo laboristo, kiu partoprenas al la fabrikado de mebloj, aŭtomobiloj, komputoroj, ktp...? Li eble eĉ ne scias tion, kion li produktas.

La dekstraj kaj la maldekstraj politikaj partioj ne plu estas kapablaj, pro la neeviteblaj ekonomiaj leĝoj, proponi esence malsamajn programojn. Pro tio ili perdas multe da subtenantoj, kiuj esperas trovi en ekstremaj movadoj pli allogajn proponojn. Ĉu redoni al la homoj pli dignan kulturen vivon ne povus esti solvo de la nuna socia krizo? La politikistoj, kiuj kuraĝos esplori tiun agadkampon, certe retrovos la konfidon de siaj elektontoj.

H. Castiau

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo komunikas:

Jam en 1986, pere de Esperanto, la komerco-ĉambro de Meuse en Francio, eldonis inventaron de la lokaj industriproduktaĵoj. En 1992, tiu ŝtatofico denove uzas Esperanton. La 45 unuaj paĝoj prezentas kvarlingvajn informojn pri turismo, ekonomio... (F, A, G, Esp.).

Ĉiu interesato povas ricevi ekzempleron kontraŭ sendo de 10 irpk (aŭ samvaloraĵo) al la ĉi-suba adreso:

CHAMBRE DE COMMERCE DE LA MEUSE

6 Parc Bradfer, F 55000 BAR LE DUC

ĈIES VOĈO

LA PIEDOJ SURTERE

Sut la titolo "Iluziaj realaĵoj" (L!96) mia malnova amiko M. Leereveld atakas diversajn partojn de mia artikolo "La iluzioj kaj la realaĵoj" (L!93). Mi provos defendi mian pozicion, tio ja estas diskuto inter amikoj, ne pli.

Unue, mi diras ke antaŭ 45 jaroj, kiam ni renkontiĝis, mi estis ankoraŭ juna naivulo. Sed 45 jaroj forpasis, dum kiuj mi laboris, mi studis, mi legis, mi spertis, mi pripensis. Jes, kion diris Marcelo tio estas vera, mi ne havis grandajn konojn pri ekonomio, kaj ankaŭ ne pri politiko. Miaj ideoj oscilis inter Trockiismo kaj similaj maldekstrulismaj movadoj, kaj anarkio. Mi havis multe da tre bonaj anarkistaj k-doĵ, ĉefe inter la SAT-anoj. La fakto estas, ke kiam mi renkontis Marcelon, mi pensis ke la Spartakista movado de Nederlando ne estis anarkista, sed branĉo de la germana Spartakista movado de K. Liebknecht kaj Roza Luksemburg.

Mi estis tiom naiva, ke en 1939 mi kredis ke se la milito okazus, oni haltigus ĝin per ĝenerala striko kiel diris k-doĵ de la P.S.O.P. (maldekstrulista grupo). Poste ili diris al mi, ke ni deziru la malvenkon de nia lando, ĉar poste estos la revolucio. Tiu malvenko okazis tre rapide, ĉar estis en la plano de la politikistoj. La avantaĝo estis ke tio ŝparis multe da homvivoj. Kompreneble mi ricevis la bombojn sur la kapon, mi malsatis, kaj finis la militon en Germanio, en malliberejo. Eble mi estis destinita al ekstermejo, mi ne scias, mia dosiero ne estis tre bona. Anstataŭ la revolucio mi vidis niajn militkrimulojn Daladier (Daladje) kaj Reynaud (Reno) denove balotitaj. Estis ili la respondeculoj de la milito en Francio, aliel ni povus kiel Svisio kaj Svedio resti ekster la milito, eĉ riĉiĝi vendante armilojn, kiel la

aliaj. Fakte ni estis ruinigitaj por 15 jaroj. Tio naŭzis min definitive pri la politikistoj, estis vera ŝoko por mi.

Poste, en 1947, mi foriris labori en agrikultura sekcio en Madagaskaro. Tie inter la eŭropanoj, la samopinianoj estis ege maloftaj (iuj instruistoj). La malagaŝoj estis tre foraj de niaj modernaj politikaj opinioj. Kelkaj kleruloj kapablis kompreni politikon, la plej multaj estis naciistoj, esperante kapti la potencon je sia profito. Do mi estis izolita, des pli ke la plej grandan parton de mia vivo mi pasigis sur la kamparo, for de la urboj. La distraĵoj estis maloftaj, mi havis plenan tempon legi kaj pripensi.

Mi vidis veran anarkion, kvankam oni ne nomis tion tiele. Estas la malagaŝoj, kiuj vivas en praarbaro, en vilaĝoj el pajlaj kabanoj. Estas nenia diferenco inter ili, ili vivas per sia propra produktado. Estis nenia vojo, nenio. Oni bezonas piede de 3 horoj ĝis 3 tagoj aŭ pli por atingi grandan vilaĝon, kie estas ĉina komercisto. Ili ne pagas takson. Kiacele? Ili ricevas nenan celon, neniu zorgas pri ili. Ili kultivas rizon, ĝenerale per movkultivado (shifting cultivation) t.e. ili bruligas pecon de la arbaro, kultivas rizon unu aŭ dufoje, kaj denove bruligas la arbaron aliloke. Ili havas kelkajn fruktarbojn, kafarbojn, kortbirdojn, rikoltas mielon en la arbaro, ktp. Unu aŭ dufoje jare ili vizitas la komerciston por ŝanĝi sian kafon, sian mielon kontraŭ iloj (hakilo) aŭ vestaĵoj aŭ alia necesajo. Ili vivtenas sin mem. Estas tre primitiva vivmaniero. Ili kutimas kaj relative bone vivas, ne estas malsato. Tiuj, kiuj deziras, povas migri kaj labori alie, kaj reveni aŭ ne, kiam pli maljunaj. Notu unue, ke tiu primitiva vivo en praarbaro ne permesas grandan homdensecon: unu aŭ kelkajn homojn sur 1 km². La vivespero ne estas longa. Ili havas rimedojn lokajn kontraŭ la ĉefaj malsanoj, sed ili ne estas tiom efikaj kiom moderna kuracarto, kompreneble. La komforto estas tute relativa: akvon oni ĉerpas el la rivero, ne estas elektro, oni kuiras sur ligna fajro, mebloj ne estas, krom kesto en kiun oni metas vestaĵojn por protekti ilin kontraŭ la parazitoj, oni dormas sur matoj, ktp, ktp...

Sed en moderna civilizita vivo la problemoj estas tute aliaj ol en vilaĝo primitiva kun centoj da loĝantoj, kiuj

ĉiuj havas proksimume la saman vivnivelon, la saman neŝcion, kaj vivas tute libere. Sed en lando kun milionoj da loĝantoj, en urboj kun centoj da miloj da loĝantoj, nepre necesas supera organizado, strukturado de la socio, kiu ne permesas tiom da liberecoj. Moderna vivo postulas largajn kaj diversajn konojn. Se nur en modesta fabriko el 200-300 laboristoj, oni demandus al ĉiuj kiel devas funkcii la fabriko, kiel oni povus plibonigi ĝin kaj ĝian produktadon, ktp... tio ne eblus: multaj estas eĉ ne teknikistoj, nur helpantoj, kaj tre malmulte konas. Se la diroj de inĝenieroj ne pli valorus ol la diroj de la helpantoj, ĉar ili estu egalaj, kiu respondecus en tiuj kondiĉoj? Por havi respondecon en supera nivelo, ne sufiĉas lerneja instruo, diplomoj, sed necesas ankaŭ praktika sperto. Ĉu vi kredas, ke la unua alveninto kapablas administri, aŭ funkciigi grandan fabrikan, provincon, ktp.?

Por redakti tiun artikolon kaj ne diri tro da stultajoj mi legis aŭ relegis kelkajn librojn pri anarkiismo, ĉefe Balkanski: "**La bazoj de anarkiismo**" (La Juna Penso, 1979), 140 paĝoj, el kiuj 120 kritikis ĝisfunde la nunan kapitalisman socion kaj nur 19 paĝoj pritraktas konstruivan anarkiistan programon. Mi legis ankaŭ "**La liberec-ana socio**" de G. Bastien, eldono de SAT, 1932. Mi tra-legis Kropotkin: "**Al la Junuloj**" kaj "**Etiko**", kiujn mi jam legis antaŭe. Kaj finfine kelkajn broŝuretojn kaj flugfoliojn de SAT-frakcio aŭ broŝurservo.

Nun ŝajnas al mi, kompreneble mi povas erari, ke anarkiismo estas utopie, malracia kaj ne vivpova en la nuna ŝtato de la moderna mondo. Anarkiismo estas iamaniere paranoja: postuli totalan egalecon, ne akcepti ke iuj estas pli inteligentaj, pli kleraj, pli lertaj, pli kapablaj ol oni estas mem. Ne ĉiuj konsentas same pri ĉiuj temoj, pri ĉiuj celoj, ktp... Krome, konsekvence, oni ĉion forigas: la ŝtaton, la justicaparaton, la monon, la diversajn ministeriojn, la funkciulojn, ktp. Anstataŭe estus malprecizaj komitatoj konsistigitaj oni ne ekzakte scias kiel, laŭ kiaj kriterioj, kiuj estus kunvokitaj en kongresoj por doni ĝeneralajn konsilojn sen ia ajn respondeco (Balkanski, p.134). Certe ŝtato havas malavantaĝojn: registaro el politikistoj kiuj interdisputas senfine, ne ĉiam honestaj kaj kapablaj, armeo multekosta ktp... Sed la ŝtato havas ankaŭ grandajn avantaĝojn: ĝi ankaŭ pro-

tektas la civitanojn kontraŭ arbitraĵoj ; estas leĝoj por la protekto de la civitano, estas sociala protekto. Moderna ŝtato havas kompetentajn funkciulojn, ne nur oficistojn ankaŭ necesajn, sed ankaŭ teknikistojn kiuj ludas tre gravan rolon en la glata funkciado de la diversaj sekcioj, la ministerioj. Ĉio ĉi ebligas glatan funkciadon de ekonomio, kio ne ĉiam estas okulfrapa por tiuj, kiuj kutimas al tiu vivmaniero, sed se oni komparas kun lando, kies ŝtato ne estas tiel bone organizita, tio estas konsiderinda. Ĉio estas strukturita meze de moderna ŝtato, ne dependas de komisionoj kaj delegitoj, kiuj interdisputos senfine kaj respondecos pri nenio. Ekzemple kiam oni bezonas novan vojon, novan linion de fer-vojo, ĉiuj interkonsentos, sed kondiĉe ke ĝi ne troviĝu apud ilia loĝejo. Alia ekzemplo : vi bezonas kafon, ĉokoladon, kion vi interŝanĝos kun Afrikanoj por havi tiujn varojn? Per mono la produktantoj povas akiri kion ajn ili deziras. Se vi proponas al ili terpomojn aŭ feron, ili diros al vi tute prave, ke ili ne bezonas, ili havas rizon aŭ alian nutraĵon, ktp.

Alia punkto : Balkanski deiras de la revolucio, kvazaŭ post la revolucio ĉiuj fariĝus anarkiistoj, ne plu estus frenezuloj ĉiuspecaj, ne plu estus homoj kun la plej diversaj difektoj : krimuloj, ŝtelistoj, monaviduloj, ambiĉuloj k.a.... Sed ĉio ĉi estas genetikaj karakteroj moralaj kaj fizikaj. Ne plu estus ŝtato por reguli, oni fidus nur al memrespondecado de individuoj, sed estas milionoj, kiuj neniam estos memrespondecaj. Estos ankoraŭ diversaj religioj kun siaj instancoj, kiuj provos kapti la potencon nome de siaj fantomaj dioj, ekzemple la islamistoj en Alĝerio, sed ili ne estas la nuraj.

Sincere mi opinias, ke la plej bona solvo nun estas instrui la plejmulton, por ke ili kapablu, ne anstataŭi individue la ŝtaton, sed kontroli ĝin senpere de politikistoj, kaj postuli de la ŝtato, ke ĝi agu laŭ saĝa politiko, ke ĝi provu solvi la problemojn por la profito de la plimulto. La ŝtato estu kontrolata de la partioj, de la sindikatoj, de la unuiĝo de konsumantoj, de la gazetaro, de la diversaj asocioj. Se necese, speciala ministerio sekurigos la rilatojn inter la asocioj kaj la ŝtato. Tio estas ja komunismo.

La fiasko de Sovetio ne devenas de la komunisma sistemo mem ĝi ne estis komplete aplikita - sed de la manko de teknikistoj, de inĝenieroj, de kapabluloj ĝenerale. Mi legis antaŭ nelonga tempo en la gazeto "Le Monde", ke la plej kleraj studentoj estis sendataj por labori en armeo kaj armilindustrio. Kvazaŭ oni manĝus ŝtalon, la agrikulturo estis tute neglektata. La rezulto estas ke Sovetio kun kolĥozoj, sovĥozoj, ktp., kun 17% da kultivistoj, malhavas nutraĵon. Dum Kanado kun simila klimato kaj 5% da kultivistoj eksportas nutraĵon ; ĝia agrikultura bilanco estas la unua en la mondo (supera al la usona). La unua afero de iu ajn ŝtato estas nutri la popolon, ĉu ne? Tiun fiaskon de Sovetio kaŭzis la malfruo de la lando, kaj konsekvence mankis teknikistoj kaj kompetentuloj ĉiuspecaj, ne nur en agrokultivado sed ankaŭ en industrio, kie la varoj ne havas bonan reputacion : laŭdire pli malbonaj ol tiuj de Hindio. Tio ne estas speciala al Sovetio. En landoj de la Tria Mondo sendependaj de tridek jaroj la situacio ekonomia malboniĝis pro la samaj kaŭzoj. Mi povus eventuale malvolvi tiun temon en venonta artikolo.

Konklude, ĉar kompreneble mi povus malvolvi tiun temon en tuta libro, sed tio estas nur artikolo, mi diru : Ni realigu unue veran komunismon. Tio postulos almenaŭ 50 jarojn en progresintaj landoj. Nun la abundana movado ŝajnas al mi la plej antaŭa en tiu direkto. Vidu la artikolojn de O.P. en *Laŭte!* Ĝiaj publikigaĵoj estas ne nur propagandaj, sed ankaŭ klerigaj. Tio estus transira vojo al anarkiismo. Versajne oni ekvidos intertempe, ĉu ŝtato estas utila aŭ ne.

J. DEKER.

LETERO EL FILIPINIO

"... Kiel promesite mi jen daŭrigas mian raporton el Filipino. Bedaŭrinde mi ne sukcesis trovi esperantistojn ĉi tie. UEA ja donis al mi kelkajn adresojn; sed montriĝis, ke plejparte temas pri redakto-roj de ĵurnaloj, kiuj mem ne scipovas esperanton, kaj unu ambasadeja sekretarino, kiu momente ne estas ĉi

tie, sed deĵoras en sia hejmlando. Usono tre sukcese lanĉis anglan lingvon en ĉi tiu lando. Ĉiu, kiu lernis skribi kaj legi, lernis ankaŭ anglan lingvon. Kiu finis ordinaran lernejon, tiu kutime parolas flue anglan lingvon. Ankaŭ en librovendejoj oni trovas nur anglan literaturon.

Mi ne povis laŭplane vojaĝi al diversaj aliaj lokoj, ĉar mi stumblis kaj tordis mian maleolon. Tamen mi jam vojaĝis por kelkaj tagoj al provinco Pangasinan, 200 km norde de Manila, kaj venontan semajnon mi intencas vojaĝi al Cebu, 500 km sude de Manila.

Do, mi devis resti en Manila pli longe ol antaŭvidite, por kuraci mian piedon. Mi diris al miaj gastigantoj, ke mi ne bezonas unuaklasan multekostan kuraciston, sufiĉas al mi kuracisto kiel la ordinara, malriĉa popolo kutimas konsulti. Kostis ja iom da peno konvinki ilin pri tio, sed finfine ili konsentis akompani min al ambulatorio en popola ortopedia kliniko. Tie la kuracistaj servoj estas senpagaj, oni devas pagi nur por medikamentoj kaj kuraciloj. Tamen oni ne kondukis min rekte al la hospitalo, sed al frato de bofrato mia, kiu loĝas vidalvide de la hospitalo. Li havas tie malgrandan frizistan salonon (kun du seĝoj), kaj lia edzino havas bone funkciantan tajlorejon. Oni diris al mi, ke multaj doktoroj kaj oficistoj en la hospitalo estas ŝiaj klientoj, kaj ke ŝi povas helpi tiel ke mi ne bezonas atendi en longa vico. Fakte oni diris la veron. Alveninte en la hospitalo, mia bo-bofratino parolis mallonge kun la pordisto, kaj jam ŝi ricevis paperon por iri al la kompetenta kuracisto. La hospitalo estas tre granda. En du vastaj haloj, en la korto kaj en la koridoroj atendis miloj da homoj (tio ne estas troigo, sed la pura vero!). Malgraŭ longa vico atendanta ankaŭ ĉe la pordo de "mia" doktoro, mi povis tuj eniri, dank'al helpo de mia bo-bofratino. En la ĉambro sidis deko da doktoroj, kaj ĉirkaŭe svarmis geflegistoj kaj kuracistaj helpantoj. La doktoro ekzamenis mian piedon kaj sendis min al rentgena stacio, kie jam atendis ĉirkaŭ centoj da homoj. Mia bo-bofratino zorgis ankaŭ tie, ke mi tuj povis eniri, kaj post pago



de la rentgena fakturo oni rapide prizorgis min. Baldaŭ la iksradiaj fotoj estis pretaj. Denove ĉe la doktoro: li ordonis gipsbandaĝon. Do mi iris al la bandaĝejo kun mia bo-bofratino, dum mia edzino aĉetis en la hospitala apoteko la necesajn materialojn ordonitajn de la doktoro. Ŝi revenis kun bandaĝoj kaj kun paro da tre malnovstilaj lambastonoj - tiaj, sur kiuj oni apogas la akselojn. Ŝi pagis por ili egalvaloron de 15 usonaj dolaroj. Mi uzis ilin apenaŭ por iri al taksio, kiu hejmen transportis min. Oni havis ankaŭ pli modernajn lambastonojn, sed mia edzino opiniis ilin tro multekostaj por mallonga uzo. - En la bandaĝejo estas ĉirkaŭ 20 tabloj, sur kiuj sidis po 3 pacientoj, kaj antaŭ ĉiu tablo unu aŭ du bandaĝistoj. Mi eksidis sur tablo, dekstre kaj maldekstre de mi eksidis knabinoj kun malsanaj piedoj samkiel mi. La bandaĝisto lerte kaj tre rapide enpakis miajn piedojn kaj krurojn en gipso, kaj jam mi povis forlasi la hospitalon. Mi esperas ne tro enuigi vin, priskribante alian enhospitaligon en la sama urbo, sufiĉe kontrastan al la supre priskribita.

Antaŭ 5 jaroj mia edzino, graveda en la dua monato, suferis aborton en la aviadilo survoje de Frankfurto al Manila. Post alveno en Manila ni transportis mian edzinon al Sta-Tomasa Universitata Hospitalo. Dum la ginekologia ĉefkuracisto esploris ŝin, gefratoj de mia edzino jam rezervigis unuaklasan apartamenton en la hospitalo. Ŝi havis antaŭĉambron por la vizitantoj, kun du tabloj, benko, sofo kaj seĝoj; telefono, radio kaj televidilo ne mankis. En la ĉambro por la malsanulo estis unu tipa malsanuleja lito, kaj dua, ordinara lito por la plej proksima parenco. Aparte estis ankaŭ duŝejo kaj necesejo en la apartamento. Ne forgesinda la malhejtilo, kiu tenis la temperaturon agrablā. Iom post iom alvenis ĉirkaŭ deko da familianoj de mia edzino, kiuj okupis la antaŭĉambron. Kelkaj foriris, aliaj venis. Ĉiam ĉeestis ĉirkaŭ deko dumtage, kaj 3-5 eĉ dumnokte. Mia edzino estis an-

koraŭ en la operaciejo, kiam flegistinoj alportis tagmanĝon "por la akompananto" (tio estis mi). La plado estis tiel riĉe dotita, ke mi apenaŭ kapablis manĝi kvaronon el ĝi. Do, mi portis la reston en la antaŭĉambron, ĝi sufiĉis por nutri la tutan ĉeestantaron. - Reveninte hejmen, mi sendis la hospitalan fakturon al la malsaneckaso de la Sociala Sekureco en Germanio, kaj ĉar la fakturo kostis malpli ol ordinara hospitala prizorgo de sama malsano en Germanio laŭ socialtarifo, ili repagis al mi preskaŭ ĉion. Tio estis antaŭ 5 jaroj. Intertempe tio ne plu eblas, ĉar oni "reformis" la Socialan Sekurecon en Germanio tiel, ke kostoj de malsaneco en eksterlando ne plu estas repagataj. Kaj la popolo glutis tion, reelektis eĉ la saman registaron. Ekzistas ja kontraktoj kun multaj ŝtatoj en Eŭropo pri reciproka pago de tiaj kostoj de la Socia Sekureco de la vizitata lando. Tamen tio ne ĉiam funkcias, ĉar kuracistoj postulas precipe de eksterlandanoj tujan, kontantan pagon, kaj tiun la Socia Sekureco ne repagas. Se oni vojaĝas al lando, kiu ne havas kontrakton kun Germanio (krom Alĝerio kaj Tunizio, ĉiuj ekstereŭropaj landoj) oni devas ĉion mem pagi. Tial la registaro nun rekomendas privatan asekuron por turistoj vojaĝantaj eksterlanden. Sed tiu ne ĉion pagas. Ekzemple, ne por malsanoj kiuj jam ekzistis antaŭ la forvojaĝo, kaj principe ne por kuracistaj klopodoj en konekso kun gravedeco. Kaj entute privata asekuro ne pagas por personoj, kiuj vojaĝas al lando, kies ŝtatanecon ili havas. Mia edzino nun do tute ne havus ŝancon ricevi ian kompenson por malsaniĝo dum vojaĝo al Filipino. Kiu malsaniĝas dum vojaĝo eksterlanden, tiu mem kulpas. Bonaj civitanoj restu hejme!

Korajn salutojn.

Manfredo."

SAT-Broŝurservo : Elĉerpigis la duparta broŝuro :

Abrégé Grammaire & Esperanto (Lentaigne)

Pacienca la interesatoj ĝis la planita nova eldono (en ununura broŝuro) estos preta...

MIRINDA EVOLUO

De ĉiam la katolika hierarkio rifuzas al la virinoj ian ajn rolon en la eklezio. Kvankam la pastroj predikas el la preĝeja katedro mesaĝon de egaleco kaj respekto por ĉiuj homoj, la virino ankoraŭ restas duaranga kreitaĵo.

Pro la apero de feminismo en la diversaj katolikaj virinasocioj, oni tamen perceptas venteton de ŝanĝiĝo. La ina emancipado estas fakto, kiun Romo ne plu povas tute neglekti.

Kiel prepari la kredantojn al tiu nova sinteno? Bela stil-ekzerco por teologoj, kiuj dum jarcentoj pravigis la malakcepton de la ina sekso per tekstoj de la apostolo Sankta Paŭlo. (Leteroj al korintanoj).

Nome, Sankta Paŭlo asertis ke la virinoj devas porti kapveston dum la preĝado kaj ke ili ne rajtas paroli dum la kornunumaj kunvenoj. Tiuj du instruoj estis la bazo de la forigo de la virinoj de kelkaj difinitaj ekleziaj oficoj.

Iom post iom la kredantinoj ne plu konsentas pri tiu diferencigo. Plie, la nuna tendenco doni al la du seksoj la samajn valoron kaj rajtojn neeviteble influas la sintenon de la eklezio.

Kion fari? Kiel kongruigi la predikojn de Sankta Paŭlo kun la hodiaŭa rekono de la virinrajtoj?

Tusimple! Kelkaj nunaj teologoj kaj ekzegezistoj, el kiuj William Walker kaj Winsome Muro - laŭdire sufiĉe kleraj kaj famaj bibliaj fakuloj - diras ke tiuj du pecoj el la leteroj de Sankta Paŭlo estas postaj Aldonaĵoj, kiujn la apostolo ne skribis mem. Aliaj preferas trovi klarigon en la fakto ke la tiamaĵ socialaj moroj ne egalrajte traktis la virinojn kaj ke Sankta Paŭlo tute nature enkondukis tiujn morojn en la novan kristanan komunumon.

Jen bela elturniĝo! Restas nun al la romaj instancoj trovi pravigon por la dudek jarcentoj da malestimo por la virinoj. Malfacila tasko, kiam oni volas kredigi ke oni neniam eraras.

H. Castiau.



POR TRANKVILIGI "FRATINON"

Ja mi legis la skribaĵon de Lopez Luna...

Kvankam mi estas maljuna, ege indignigas min ĉiufoje la mizoginecaj gurdaĵoj. Mi ne rebatis la asertojn de Lopez Luna, ĉar en L! 93 - 94 (1981) aperis debatemu : "La virina problemo". Mi kontribuis en tiu debato, funde traktita.

Lopez Luna : "La virinoj similas al floroj en forcejo. Dum floroj troviĝas tie, ili kreskas fortaj kaj belaj, sed ekster forcejo ili tuj velkas." Tio estas vireca opinio : la virino estu bela, ĉiam bela - konstanta stato de la viro, ĉu ne? Pro tio, kiam kunulino "velkas", la kunulo emas anstataŭigi ŝin per pli juna ol li, kaj se eblas, bela homo. Kompreneble, la viro konservas sian junecan korpon dum sia tuta vivo ; la viro nepre bele maljuniĝas... Ĉe maljuniĝanta virino ofte la gracia talio estas for ; iuj dikiĝas, tiam fariĝas mokaĵo. Kaj plie, maljuniĝanta virino estas malestiminda "aĉaĵo". Ekzemple en PIV, p.3 : "Neniu kreaĵo estas por mi tiel abomena, kiel araneo kaj maljuna virino". Ĉu vi ne rimarkis, ke en ĉiuj vortaroj - franca, eĉ esperanta - kiam temas pri aĉiga senco de vorto, la donita ekzemplo temas pri virino. Eblus skribi multajn faktojn sur tia kampo! Sed ĉi-foje sufiĉas.

Jen pli seriozaj faktoj. Malkaŝe malestimis virinojn kiel Aristoto, aŭ Sankta Paulo, aserti ke ili estas malsuperaj pri inteligenteco, kiel Aŭgusto Comte ; opinii kiel J.J. Rousseau, Napoleono aŭ Nietsche, ke sklaveco estas ilia natura stato... tiaj argumentoj nun fariĝis nedefendebaj.

Laŭ D-ro Edwards "Tiu ĉi estaĵo estas sencerbuloj ; en ilia kompatinda kapo estas nebuleco, kiam ĝin oni pleniĝas". La fakto mem, ke tiun tezon longatempe la kuracisto subtenis, pravas ke, kiam temas pri virinoj, sin esprimas la viro, ne la kuracisto!

Kiam multaj virinoj fariĝis instruistinoj, kuracistinoj, advokatinoj, kiuj kompatinda kapo ne dispeciĝis, male al la antaŭvidoj, oni diris al ili : Konsentite, vi sukcesis akiri la samajn diplomojn, sed la laboro forigos vian virinecon. Neblos al ni vin amori.

Viktoro Hugo skribis al Leono Richer : "Estas dolore tion diri, en nia civilizacio estas sklavino. Eufemisme la Leĝo nomas ŝin neplenaĝulo! Tiu neplenaĝulo, laŭ la Leĝo, tiu sklavino, laŭ la realo, estas la virino."

Tia agmaniero kontraŭ la virinoj fontas el invento de la "prapeko" fare de la Eklezio, celanta pluigi la virinan servutecon. De tiam kulpas nur la virino pri ĉiuj suferoj, kiuj trafas la homaron. En la pasinteco la generadon kaj la inajn seksojn oni emis konsideri kiel diablaĵojn, danagerajn faktojn. De jarcentoj la Eklezio, la Scienco, la Moralito tute interkonsentis por senbrue, ekde la naskiĝo, nin senkapigi. Ĉar ni ricevis inan edukadon en vira socio, laŭ viraj kriterioj, la virinoj ne emis krei automobilon k.s.

Mi rimarkigas al Lopez Luna, ke la progresado de la homaro fontas ne nur el invento de aĵoj, iloj, sed ankaŭ, eĉ ĉefe, de la filozofio, homaranismo, idealismo. En tiu kampo la virinoj egalas, eĉ foje superas la virojn. Multnombraj virinoj batalis kaj batalas en tiu kampo. Kompreneble, ne eblas enlistigi ĉiujn. Jen kelkaj nomoj : Christine de Pisan, Jeanne Deroin, Flora Tristan, Claire Voilquin, Louise Michel, Simone de Beauvoir.

Lopez Luna finis sian artikolon per mizogineca frazo "Mi naskiĝis el virino kaj havis edzinon, kiun mi multe amis."

Jen la manieroj esti mizogino :

- Tiu, kiuj kalkulas je virinoj por certigi la pluvivon de la familio, nome de la virina feliĉo.
- Tiu, kiuj asertas, ke ili defendas ilin kontraŭ ili mem (ja iŝin kontraŭ iŝi mem).
- Tiu, kiuj ilin respektigas kiel patrinojn, kio permesas al ili malestimu ilin kiel seksajn objektojn.
- Tiu, al kiuj ili estas nepre necesaj.
- Tiu, kiuj provas evitigi al ili "la detruantan laboron kaj la intermiksatecon en la fabrikoj".
- Tiu, kiuj senĉese sin apogas sur la laŭdiraj leĝoj de la Naturo, kiam temas pri virinoj.
- Tiu, kiuj opinias ke, ĉar pli instinktaj, la virinoj estu perantoj inter la universo kaj ili.
- Tiu, kiuj omaĝas nur al ilia beleco, komplementa de la vira inteligenteco.

... Ĉiuj ĉi estas mizoginoj kaj des pli danageraj, ke ili neas aŭ ne scias tion.

Evidente ni konfesu : la homaro estas mizogina. La homoj estas mizoginaj kiel ili spiras, t.e. nature, kun simila senkulpeco, simila pura konscienco. Kiam oni konsideras la Historion, la literaturon aŭ la filozofion, oni konstatas,

ke la mizogineco estas tiel profunda, tiel intime miksitaj en ĉiuj agoj de nia vivo kaj en nia kulturo, tiel disvastigitaj kaj tiel... normala, finfine. Kaj plej ofte oni ĝin eĉ ne distingas. Tamen ĝi estas en preskaŭ ĉiuj religioj, kaj ankoraŭ hodiaŭ pezas sur la agmanieroj de la plimultaj viroj kaj de granda nombro da virinoj.

... Ĉar neniam, aŭ preskaŭ neniam, la privilegiuloj zorgis pri la animstatoj de tiuj, kiujn ili subigis, ĉu pro la denaska origino, ĉu pro la sekso, la haŭtkoloro. Ĉiam ili opiniis sin privilegiitaj de Dio, de la Providenco, aŭ de la Naturo. Pro tio ili neniam havis skrupulon.

Suzanne.

MI ESTAS NOVA LEGANTINO

... de Laŭte (danke al intervjuo en Revuo Esperanto de decembro 1991). Mia fako estas edukado (profesiigo) de Cseh-Instruantoj, do plej interesas min artikoloj rilate la lingvouzon. Pro tio mi nun ŝatus reagi al la artikolo de L: 98, paĝo 23: "Resp. al ciumada Valo".

Mi samopinias kun la aŭtoro V.L. kaj liaj argumentoj kontraŭ uzo de "ci". Mi mem uzas la lingvon 30 jarojn, partoprenante internaciajn kongresojn, konferencojn, E-renkontigojn kaj mi konstatis, ke la formon "ci" uzas nur francoj.

La ĝenerala eraro, kiun faras multaj esperantistoj, estas la emo traduki Esperanton kiel eble plej precize de la nacia lingvo, kreante tiel "balaston", kiel ekzemple tiu franca "ci". Oni ne atentigas la valorojn de Esperanto, kiuj ĝuste evitas tiujn nenecesajn balastojn. Ĉefe kulpas la tradicia instru-metodo gramatik-traduka, kiu katenigas uzanton ĉiam al nacia lingvo. Lernante Esperanton pere de Esperanto oni evitas influon de nacia(j) lingvo(j), tuj komunikas en la lernata lingvo, sen tradukoj, ĉar oni lernas pensi en la lernata lingvo, do uzi ĝin laŭregule. Tion celis Zamenhof, kreante la lingvon por "monda komunumo" kaj Andreo Cseh kreis la instrumetodon por realigi tion. Do ni ne difektu nian "Bonan Lingvon" (libro de Claude Piron) per enkondukado de nenecesaj neologismoj. Ili ne "pliriĉigas" la lingvon, kiel kelkaj opinias, sed "plimalfaciligas" ĝin, mi dirus.

Iom similan opinionon pri nenecesaj neologismoj esprimas ankaŭ M.L. (L:95, paĝo 3), sed li mem uzas la lingvon ankaŭ nekutime, uzante participajn finaĵojn kiel memstarajn vortojn (plia pruvo pri "plibonigado", kiu nur malkomprenigas la tekston).

Bedaŭrinde homoj ĝenerale ne kapablas akcepti la plej simplan solvon, sed ĉiam serĉas "plibonigojn" kaj per tio "kaosigas" la lingvon.

Komprenoble la lingvo devas evolui, tiun eblon Zamenhof lasis al ni, uzantoj, sed kiamaniere oni komprenas tiun evoluon... per kreado de "dikegaj" vortaroj (PIV), gramatiko (PAG), opiniante, ke per tio oni konvinkos la eksteran mondon pri la valoro de Esperanto? Falsa opinio, speciale nuntempe, kiam la homoj bezonas kaj daŭre serĉas pli rapidan eblon komuniki.

Eble la legantoj de Laŭte jam aŭdis pri nova lingvo-projekto EŬROPIK. La aŭtoro de ĝi prenis Esperanto-gramatikon kaj laŭ ĝi kreis novan vortprovizon, bazante ĝin sur anglaj vortoj. Lia argumento estas, ke la anglan lingvon oni devige instruas en multaj lernejoj, do granda parto de la publiko komprenos ĝin, do ankaŭ uzos aŭ lernos ĝin.

Por Azio kaj Afriko li proponas "Aziopik" kaj "Afrikopik" kaj krom tio iun "interlingvon" por ĉiuj tiuj "pikoj". Eble tiam Esperanto havos sian ŝancon? Eble jes, se almenaŭ ni uzantoj (precipe instruantoj) **ne permesos ĝin pli "plibonigadi"!**

La aŭtoro de tiu nova projekto diras, ke Esperanto ne progresis/as tiomgrade kiom ĝi meritis, pro uzo de la latina alfabeto, pro tio li konsilas tiujn kontinentajn "pikojn".

La novaĵon pri EŬROPIK dissendis fine de marto 1992 Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00 950 VARSOVIO. Tiuĵ, kiuj interesiĝas pri la detaloj, skribu al la redaktoro Andrzej Pettyn.

Mila van der Horst-Kolinska.

- la venonta numero aperos fine de junio -

Por Chaplin en Parizo

Homo kara en Parizo,
Chaplin sur la strato,
mi por vi poemon skribas,
kiel via frato.

Mi de vi nenion scias,
eĉ ne aŭdis vorton,
sed amiko, mi admiras
vin kaj vian forton.

Homo rara vi ja estas,
de artista grando,
kun melono sur la kapo
belo de la lando.


Via mondlingvo muta
via palpebrumo
montras, ke la homo estu
pli ol la kostumo.

Kiel vi la kisojn ĵetas
en pariza parko,
tio estas majstroverko
ne de iu ŝarko.

Tio estas ja mesaĝo
el pli bona mondo,
kaj mi dankas, kamarado,
gaja vagabondo.

Ke vi sanu, mi deziras,
kun la sama ĝuo
je silento el la koro,
meze en la bruo.

skribis Hagen Hirte.



VORTOJ DE MALJUNULO

valo

FANTAZIO EN UNIFORMO

(sekvo kaj fino)

Kiam mi estis sengradulo

Septembro 1939 : ekde la proklamo de la milito miaj kamaradoj, kiuj konservis siajn du aŭ tri galonojn, estis mobilizitaj kaj tuj senditaj al fronto.

Mi estis mobilizita en februaro 1940 kiel soldato sekretario ĉe la rekrutburoo en NIMES : kvieta sektoro.

La duan aŭ trian tagon mi ĵetis panon en rubujon sur la korto de la kazerno. Tion vidinte, patriota soldato, movita de virta indigno, tuj kuris kuraĝe denunci min al la kapitano kiu prizorgis la disciplinon interne de la kazerno. Tiu ĉi alvokigis min. Divenante pri tiu temo, mi prenis antaŭzorgon. Kiam la trigalono komencis pridemandi min, mi trankvile eliris el miaj poŝoj panpecojn kovritajn de verda ŝimo kaj metis ilin delikate sur lian tablon, sub lia nazo, dirante kun plej respekta tono : "Mia kapitano, ĉu vi manĝus tiun panon?"

Lia reago estis tuja : "Lasu al mi tiujn ĉi konvinkajn pecojn kaj reiru al via posteno."

Kun klako de kalkanumoj, bela saluto, sendifekta duonturno dekstren, mi eliris per kadeca paŝo. Dume la denuncinto, ruĝa pro kolero kaj konfuzo, siaflanke retirigis sub mokridoj de la ĉeestantoj.

Ekde la morgaŭo ni ricevis manĝeblan, eĉ bongustan panon.

En la buroo mi pasigis trankvilajn horojn, solv-

ante krucvortenigmajn aŭ manskribe plenigante longajn slipojn per detalaj informoj veraj, sed perfekte senutilaj. Mi ŝovis tiujn slipojn inter paĝojn de dikaj grandformataj registroj kaj zorge gluis ilin sur margenoj, imagante la miran mienon de profesia sekretario, kiu poste eltrovos tiujn strangajn dokumentojn.

Kompreneble dume ne rapidis mia ĉefa kaj urĝa misio, nome sendi ordonajn vokojn al mobilizitaj rezervuloj. Pluraj amikoj kaj kamaradoj miaj probable ne sciis, ke al mi ili ŝuldas kelktagan aŭ kelksemajnan prokraston en sia mobilizo. Kion vi diras? Sabotado? Ne, eble... Sed mi metas demandon: Ĉu vere estas devo de homo lojale servi la armeon, tiun kriman entreprenon, kaj efike kontribui en milito, tiu krimo kontraŭ la homaro? La demandon mi lasas al via sopra medito.

Baldaŭ finiĝis la "stranga milito" dum kiu nenio okazis, kaj komenciĝis la vera milito per invado de Nederlando kaj Belgio, kaj la germanaj trupoj komencis mordi en la norda franca periferio.

La majoro buroestro, kiu vidis kelkajn humurajn krokizojn de mi faritajn, komisiis al mi pli noblan taskon: desegni tre grandformatan mapon de Francio. Li pendigis ĝin sur panelo, kaj ĉiutage per globkapaj pingloj li konkretigis sur la mapo la moviĝon de la fronto. Tiu moviĝo, ĉiam sandirekte pli kaj pli rapidis. Post kelkaj tagoj la majoro diris al mi: "Ni forprenu tiun ĉi mapon. Ne endas subfosi la moralan staton de la homoj."

Sur la tuta larĝo de Francio la movado al sudo de la dismembritaj francaj armeoj, miksitaj kun kompatindaj kolonoj de fuĝantaj civiluloj, akceliĝis, pelataj de la germanaj tankoj kaj aviadiloj.

En tiu kriza situacio, la altaj staboj elpensis genian ideon: la soldatoj sekretarioj, ĝis tiam ne armitaj, ricevos ĉiu, po unu fusilon, unu bajoneton kaj stokon da kartoĉoj. Mi elturniĝis por ne ĉeesti la distribuon. Neniu rimarkis mian foreston kaj mi restis la sola - eble en la tuta garnizono - sen armilo.

Samtempe mi anstataŭigis mian helbluan uniformon

per fantazia kostumo konsistanta el:

- paro da blankaj ŝnursuoj;
- malhelblua pantalone el tolo, tenata per mallarĝa zono el blanka ledo;
- kakia ĉemizo el la neelĉerpeblaj usonaj stokoj de la antaŭa milito;
- nigra kravato el silko, la eleganta noto en tiu tuto;
- kaj vaska bereto.

Tiel vestite mi povis facile eliri el la kazerno, en kiu la buroo okupis anguleton kun aparta ŝtuparo kaj aparta elirpordo ne militiste gardata. Mi sufiĉe ofte vagis tra la urbo dum deĵoraj horoj kaj tiel mi pli bone ekkonis tiun urbon, kie antaŭe mi konis nur la romiajn monumentojn.

Iun posttagmezon, trankvile promenante sur bulvardo kun amikino, mi renkontis sur la trotuaro preskaŭ nazalnaze la majoron buroestro. Mi ne salutis lin kaj li, kiu bone min konis, ŝajnis ne vidi aŭ ne rekoni min. Kredeble ankaŭ en Nimes jam ankriĝis mia famo de ne amendebla margenulo, kaj oni preferis ignori min.

En dimanĉoj kutime mi iris al Aleso (40 kilometroj), kie estis mia familio ĉe mia patro. Iun dimanĉon la familio estis en Florako (110 km) kaj pro la katastrofa evoluo de la milito, la tuta trupo ricevis ordonon ne eliri el la urbo. Ĉiuj elirejoj estis militiste gardataj. En la stacidomo staris aparte forta gardo. Mi tamen sukcesis fraŭde eniri en trajnon kaj mi neatendite alvenis en Florako, je granda ĝojo de la familio. La morgaŭon mi facile revenis al mia posteno, kun iom da prokrasto.

La deksekan de junio laŭtparolilo instalita sur placo disaŭdigis la faman diskurson de la nova ŝtatestro, marŝalo PETAIN, la pretendita venkinto ĉe VERDUNO: "Kun premata koro mi diras al vi, ke necesas ĉesigi la batalon...". Mi aplaudis, opiniante ke eble unuan fojon en sia vivo la maljuna marŝalo faris ion bonan. Ĉirkaŭ mi mi vidis nur longajn konsternitajn mienojn.

La mallongan paroladon sekvis vibranta Marseljezo.

Ĉiuj malkovris sian kapon krom unu soldato, kiu estis kalva. Alia furioze impetis al li, demetis lian ĉapon kaj ĵetis ĝin teren. Mi rapide kliniĝis, prenis la ĉapon, remetis ĝin sur la kapon de la kalvulo, resurmetis mian bereton, kaj kriis al la agresinto: "Ci, stultega patrioto! Ci forgesas, ke ni estas en la lando de la homaj rajtoj!". Eble mi retrovis en tiu cirkonstanco mian aŭtoritatan komandonon de eks-oficiro. La stultega patrioto, pli alta kaj pli fortika ol mi, ne provis rebati, kaj diskrete malaperis en la amaso. Neniu provis refari lian stultan geston! Neniu protestis, kaj pluraj resurmetis sian kapveston antaŭ ol sonis la lastaj notoj de la nacia himno.

La morgaŭon mi diris al miaj kolegoj: "Baldaŭ ni mem malmobilizos nin". Sed tio estis vanta fanfaronado, ĉar mi eraris pri la sekvo de la aferoj: tre baldaŭ venis desupre la ordono: ĝenerala malmobilizado. Mi bruligis sur la korto mian militistan libreton kaj pluraj kolegoj imitis mian simbolan geston: ekde tiam ni havos nenion komunan plu kun la armeo.

Nun ni parolu serioze. Eble iom amuzis vin la rakonto pri miaj klaŭnaj ĵongladoj kun la disciplino. Eble ili iam pensigis vin pri la brava soldato ŜVEJK. Sed kiom ili pezas en komparo kun la neŝancebla firmeco de Louis LECOIN, tiu ĉiama senkaŝa ribelulo, tiu dumviva senmaska oberifuzanto? Li pagis por tio per longaj malliberoj, sed li neniam cedis.

ŜVEJK kaj VALO estas nanoj apud la giganta morala staturado de LECOIN. Tiu viro malalta, malfortika, korpore fragila, sed kun ŝtala energio, per neperforta lukto fine venkis plej potenca organizon. Dank'al lia heroo malsato-striko fine cedis la tre militarista, tre aŭtoritata ŝtatestro, Generalo DE GAULLE. Tiu ĉi konsentis legostatuton al la militrifuzantoj.

Certe tiu statuto ne estas perfekta, ĝi estas multe plibonigenda, sed ĝi almenaŭ ekzistas, ĝi oficiale agnoskas la rajton pri konsciencia objettato, la rajton rifuzi la armitan servon, kiu estas pormilita instruado kaj trejnado. Ĝis tiam la objettatoj devis aŭ cedi kaj akcepti la militistan servon, aŭ pasigi

jarojn de tribunalo al prizono. Nun ili povas elekti aŭ ordinaran militistan servon, aŭ pli longan civilan nacian servon sen armilo. Kompreneble multaj pro oportunismo, aŭ pro kutimo, elektas la unuan solvon, sed la pli konvinkitaj kaj kuraĝaj elektas la duan.

Tio estas grandega morala progreso. Ni ne forgesu al kiu ni ĝin ŝuldas. Admirinda, kara Louis LECOIN! Ni konservu en fidela memoro lian nomon: ĝi estas tiu de homo vere kaj eminente homa, rarega speco.

PLIBONIGI LA INSTRUADON DE ESPERANTO...

Dum la SAT-Amikara kongreso, la diskuto pri lingva instruado naskis ĉe kelkaj la deziron pliprofundigi la temon kaj teorie kaj ĉefe praktike. Por tion fari, du vojoj estis proponitaj.

Unu estis la realigo de kajero, en kiu ĉiu interesato raportos pri siaj spertoj kiel instruanto (sukcesoj, malsukcesoj, ideoj, ludoj...) kaj ĉerpos el alies raportoj novajn ideojn por plibonigi sian instruadon.

La dua estis la organizo de semajna staĝo, dum kiu oni provos konkrete respondi jenan demandon: ĉu eblus bazigi la instruadon de Esperanto sur komunik-situacioj, por doni al la lernado, ekde la komenco, ĝian veran celon: komuniki?

La staĝo okazos (ne pli ol 15 personoj) apud Limoĝo, de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1992 ĉe:

Isabelle JACOB

Pomarbo

Les Monneries

F-87200 SAINT BRICE

Eblos tendumi surloke. Tri ĉambroj (po 2 personoj) estos disponeblaj por tiuj, kiuj ne povos kunporti tendon. Eblos aranĝi inter si la aĉetojn kaj la preparadon de la manĝoj, por ke la restado estu kiel eble plej malmultekosta.

Interesatoj sin turnu al Isabelle JACOB (tel. 55 03 54 76) aŭ al: Esperanto, F-47470 BEAUVILLE (tel. 53 95 40 26).

"KION CI FARACAS ĈI TIE?"

De kiam Maŭrico vidviĝis, lia apartamento fariĝis pli dormoloko, ol vivejo. Kiel purrasa Parizano (pro tio li fieras, ĉar neoftas tia specimeno), li ŝatas traŭbe promenadi gapante kaj ĝuante la ĉirkaŭvivantajn homofluojn. En tiu maja sabato aparte svarmas la posttagmezaj piedirantoj; sonas fremdaj lingvoj, obtuzas la senĉesa aŭtoronronado. En siaj neciritaj ŝuoj, velurpantalono kaj negladita kotonjako Maŭrico laŭiras la sejnajn pontojn. Lin gajigas rememorado pri ĵus legita verko, en kies unuaj ĉapitroj sprita aŭtoro elvokas "la bonan malnovan tempon", kiam fariĝis malpermesite al porkoj libere vagadi sur la sentrotuaraj stratetoj, krom al tiuj de la Antonanoj, per ĉokolaj sonoriletoj laŭordone ekipitaj; kiam en la duba krepuskohoro sonis la postfenestra averto: "Je akvo!", dum ne piedlertan preterpasanton trafis la naŭza enhavo de noktovazo.

Ĝuste en tiu momento ektiras la maŭrican rigardon titolo de nebindita libro el skatolo de brokantisto superelstaranta: "Tiel vivis niaj prauloj". Sciavidon Maŭrico ne kontraŭas. Li ĝin elprenas, trafoliumas kaj frandas la jenan poemon, kvankam de nefamiĝinta aŭtoro:

"La hor' tagmeza jen ekbatas.
Pri l'hodiaŭa tag', sabatas.
Troviĝos tie multaj aroj
Da ĉarumoj, da ŝarĝoĉaroj.
Mi plenŝtopadon antaŭflaras.
Rapidu! Ĉu al vi ne klaras,
Ke neeblos por ni transpaso
De la terura embaraso,
Vojotan vojon kiu baras?
Jam ekimpetas ŝuflikisto
Skoldonte al ĉarkondukisto:
Plenplena ĉar' je aĉa rubo
Kroĉiĝis al rad' de ĉi bubo.
Kaj se li paŝos paŝon plu,
Ĝi falrenversos sin en sku'.
Pasrajton jen koĉer' indikas,
Sed pro l'ekmovo sin implikas

En konfuzon de du-tri ĉaroj
Surŝutitaj de brulbranĉaroj.
Komencas ĉiuj longan diron,
Koĉer' postulas retroiron,
Ĉaristo tuj rebatas, ke
Eĉ paŝon po unu, ja ne."

Kaj konkludas la maŭrica saĝo:

"Suo sun', nenio nova, ve!"

Ĉar la brokantisto suspekto atendas, li eltiras la monujon, pagas kaj enpoŝigas legotajon por sendorma nokto.

"Nun, kien mi iru? Nu, hieraŭ la televida regionbulteno anoncis oficialan akcepton de hinda moŝto - mi ne plu scias, kiun -, kun vesperbufedo ĉe Eiffel-turo. Jen vidinde!"

Maŭrico sin direktas al la vasta Kampo de Marso, kie tiom da fojoj la nepo Mateo jam rajdis sur la tieaj azenetoj je kostoj de molkora avo.

Kiam li alproksimiĝas al la metalskeleto, svarmas la kungapantaro, ŝajnobrilas la farbitaj metalajoj de luksaj veturiloj; piedstaradas senmovaj policianoj en parada uniformo. Maŭrico antaŭenpaŝetas por kiel eble plej fidele enkapigi la detalojn, ĉar al lia rakonto avidos la nepo. Kaj tiel mens-okupita estas Maŭrico, ke nek pri la tempopaso, nek pri la gapantara malmultiĝo li ekkonscias, ĝis la momento, kiam li rimarkas, ke li preskaŭ solas inter la turo kaj densa vico da policianoj. Li ekkonfuziĝas, meĥanike enmetas la manon en la enan poŝon de la jako kaj trafas nenion en ĝi.

- Diable, li interne grumbblas. Post transvestiĝo mi ne kunprenis la identigilon. De post la okazintaj en 1968 tumultoj mi ĉiam ĝin kunhavas. Jam soli sur ĉi tiu senhoma spaco, meze de tiom da policianoj, en miaj ĉiutagaj vestaĵoj! Per kio mi praviĝus, se iu el ili demandus: "Nu, kion ci faracas ĉi tie?"

Retroiro preskaŭ neblas. Nura solvo: antaŭeniri, nerimarkite enmiksiĝi en tiun skipon de surlokaj prizorgantoj simile vestitaj kaj ne atentovekaj.

Kiel en filmo ĉio disvolviĝas en plena rapideco: eniro en la nordpiedan lifton; eliro ĉe luksega salono meze de lumblindigo kaj florabundo. Svarmo de smokingoj; alterno de kudroartaj longaj roboj kun brilkoloraj sarioj

sur delikataj brunhaŭtulinoj. Reciprokado de salutoj, kapoklioj, ridetoj, komplimentoj; fotilaj fulmoj; zumzumado de kameroj. Post la bonvenigaj vortoj, oficialaj paroladetoj en sinsekvo, dum ĉiu priŝopiras la momenton, kiam en konfuzo de kunzumado kaj kunpusigado, bonmanierigitaj kelneroj cirkuligos pletojn surkovrigitajn de sandviĉetoj, farĉitaj olivoj, krakenoj aŭ kremkuketoj. Kvan-kam Maŭriĉo duon-kaŝiĝas en fenestra embrazuro, preterpasanta kelnero etendas al li pleton kun salmaĵo, kaviaro (pri botargo ĉi tie, ja fi!) anserhepataĵo... Maŭriĉo subfalas kaj prenas al si tri frandaĵojn.

Nun pokaltintado, korkopafetado, disfluigado de la likvaĵo reĝa. Tuj senbriditaj la langoj, eksplodaj la ridoj, sovaĝula la impeto bufeden, kio instigas Maŭriĉon al laŭgrada malstreĉiĝo.

Post kvar pokaloj da ĉampanvino senhezite proponitaj de lertamovaj kelneroj lia animŝato atingas la sojlon de beateco. For la timo pri stulta demando de deĵoranta policano: "Kion ci faracĉas ĉi tie?"

Tial dentokrakigante gustoflatajn forgesitaĵojn li paciencas, ĝis li povos enŝoviĝi en la desuprigan lifton en protekta kunesto de similvestitoj kaj trankvilanime sin direkti al la fila hejmo por fanfaroni pri sia ĵusa aventuro. Antaŭ ol enliftiĝi li sukcesas enkapti plenmanon da krakenoj sur tuketo kuŝantaj; ilin entukigas (higieno respektindas!), la tuton enpoŝigas kaj antaŭĝuas sian sensaciportan viziton.

Noktiĝas nun super la Kampo de Marso. La ventlulataj arboj murmuras al la Maŭriĉaj oreloj: "Kion ci faracĉas ĉi tie, ci olda malsaĝulo? Tamen iru sentime, ĉar cian avan sekreton ni ne perfidos."

Spite la malfruan horon Maŭriĉo sonorigas ĉe la filo. Mateo en sia pijamo spektas movbildojn rajde sur fotelbrako. Kiam Maŭriĉo enpaŝas la vivsalonon, la nepo impetas al lia kolo, lin kisas, flankentiras, tiklas, taŭzas... Kaj li ekvidas la avan manon enpoŝe baraktantan.

"Avo, kion ci faracĉas..."

Sed la patro seke admonas: "Ĉi tie, Mateo, ne uzindas cia lerneja esprimmaniero."

Tamen la indulga avo, elpoŝigante la kukoplenan tuketon, ŝerce rebatas:

en la historio de la naturscienco

Nomante la 18an jarcenton Jarcento de la Lumoj, oni pensas plejofte pri la filozofoj, kies verkoj preparis la mensojn de la intelektularo al revolucio en la ideoj. Sed en tiu sama tempo vivis ankau kelkaj matematikistoj, fizikistoj kaj naturesplorantoj, kies nomoj elstaras kiel mejloŝtonoj sur la vojo al scienca revolucio, kiu eksplodis en la 19a jarcento, kaj daŭre elvolvas novajn akirojn.

En mia enkonduko al la traduko de "Filozofio zoologia" mi skribis: "Lamarko unua en la mondo ekvidis, kaj prezentis kiel fakton la evoluadon de la vegetalaj kaj animalaj specioj". Tio estas vera, se oni observas, ke li unua proponis koheran teorion pri tiu fakto, eĉ se ni scias nun, ke lia teorio ne estas plene valida. Sed li havis antaŭulojn en la antikveco, en la Renesanco kaj en la 18a jarcento; tiuj eksuspektis, ke fosilioj estas restaĵoj de iam vivintaj estuloj. Inter ili elstaras Buffon.

Georgo Ludoviko Leclerc, grafo de Buffon (1707-1788) rimarkis, ke la fosiliaj specioj estas diferencaj laŭ la diversaj tavoloj de la tera krusto, en kiuj ili kuŝas. En 1778 li distingis en la estinteco de la naturo sep grandajn periodojn, multe malpli longajn ol ni nun scias, sed multe pli longajn ol la sep "tagoj" de la Genezo. Kaj per genia intuicio li havis ekkomprenon pri kontinua evoluo de la flaŭro kaj faŭno tra tiuj sinsekvaj periodoj.

Lia samtempulo Voltero, kiu cetere havis grandajn kvalitojn, kaj estis pri ĉio scivola, sed en sciencoj estis nur supraja diletanto, direktis al la ideoj de Buffon sian kutiman mokeman skeptikecon. Laŭ li estas neeble, ke maro iam kovris montajn suprojn, kaj la fosilioj trovitaj sur Alpoj estas aŭ kapricoj de la naturo, simplaj ŝtonoj similitaj konkojn, aŭ nuntempaj konkoj tie lasitaj de pilgrimantoj sur sia vojo al Romo aŭ al Santiago de Kompostelo. Tiel, volante ridindigi la opinion de Buffon, li sin mem ridindigis por la estontaj legantoj.

DENOVA NASKIĜO

En 1802 Cuvier (Georgo, barono Cuvier, 1769-1832), kiu serioze pristudis fosiliojn kaj vere fondis la paleontologion, konfirmis la vidon de Buffon pri apartaj flauroj kaj faŭno-
noj propraj al sinsekvaj periodoj. Sed li imagis, ke en la fino de ĉiu periodo tutplaneda kataklismo plene detruis la tiaman vivantaron, kaj poste estis kreitaj tute novaj speciaroj. La relative abrupta malapero de amonitoj kaj de dinosaŭroj en la fino de la sekundara erao ŝajnas pravigi tiun teorion. Sed en 1809, en sia **Filozofio Zoologia**, Lamarko montris, ke inter sinsekvaj specioj estas entute konstanta evoluado, eĉ se kelkaj efektive malaperas sen heredantoj. 50 jarojn poste, Darvino genie finstarigis la teorion pri natura selektado en la lukto por la vivo. En tiu lukto la plibone armitaj kaj pli flekseblaj pluvivas, adaptiĝante al ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj, dum aliaj malaperas. La transformismo de Darvino ne detruis la evoluismen eksuspektitan de Buffon kaj priskribitan de Lamarko, sed kompletigis ĝin. Nun preskaŭ ĉiuj paleontologoj, eĉ kristana kredanto kiel Teilhard de Chardin, jezuito, (1881-1955) agnoskas la evoluadon kiel firme pruvitan fakton.

Buffon en sia tempo ankoraŭ ne disponis la materialon, per kiu laboris Cuvier, Lamarko kaj Darvino. En sia monumenta **"Natura Historio"** li priskribis la animalajn speciojn laŭ ilia ekstera aspekto, pli poezie ol science, kaj lia verko distingiĝas pli per la admirinda stilo de lia prozo ol per scienca valoro. Li tamen estis unu el la torĉoj, kiuj briligis la Jarcenton de la Lumoj, kaj malfermis la vojon al moderna scienco.

VALO

"KION CI FARAĈAS ĈI TIE?" (fino de p.24)

"Kion ci faraĉas ĉi tie? Jen denove la persekuta demando... Ĝuste por rakonti al ci eksterordinare nekredoblan aventuron mi venis en tiu malfrua vesperhoro. Sed la tuton de tia aventuro ci plene komprenos nur, kiam ci formanĝos la delikataĵojn, kiujn mi sukcesis... akiri por ci."

Simone BONIOL

"Neniu povas havi la eternan vivon, se li ne estas denove naskita" diras la Biblio. "Se vi ne estas denove naskita, vi neniam povas esti feliĉa en via vivo kaj sekve longe vivi", diras la paganoj. Oni diras, ke la paganoj ne adoras Kriston, do ne povas ĝui la eternan vivon : Ĉu tie ne kuŝas ia kontraŭdiro, aŭ ĉu "denova naskiĝo" Biblia estas alia, ol tiu de la paganoj?

Ni legu parton de la evangelio laŭ Johano, tria ĉapitro. "1. Estis viro el la Fariseoj, nomata Nikodemo, ĉefo inter la Judoj ; 2. Tiu venis al li (Kristo), nokte, kaj diris al li : Rabeno, ni scias, ke vi estas instruisto, veninta de Dio ; ĉar neniu povas fari tiujn signojn, kiujn vi faras, se Dio ne estas kun li.

3. Jesuo respondis kaj diris al li : Vere, vere mi diras al vi : Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio.

4. Nikodemo diris al li : Kiel povas homo naskiĝi, kiam li estas maljuna? Ĉu li povas eniri denove en la ventron de sia patrino, kaj naskiĝi?

5. Jesuo respondis : Vere, vere, mi diras al vi : Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas iri en la regnon de Dio. 6. Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno, kaj tio, kio naskiĝas el la Spirito, estas Spirito. 7. Ne miru, ke mi diris al vi : Vi devas esti denove naskita. 8. La vento blovas, kie ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras. Tia estas ĉiu, kiu estas naskita de la Spirito.

9. Nikodemo respondis kaj diris al li : Kiel povas tio fariĝi?

10. Jesuo respondis kaj diris al li : Vi estas la instruisto de Izrael, kaj ĉu vi ne scias tion? 11. Vere, vere, mi diras al vi : Kion ni scias, tion ni parolas, kaj kion ni vidis, tion ni atestas ; kaj vi homoj ne akceptas niajn atestojn. 12. Se mi aferojn surterajn diris al vi, kaj vi ne kredas, kiel vi kredos, se mi diros enĉielajn?

13. Kaj neniu supreniris en la ĉielon, krom tiu, kiu mal-supreniris de la ĉielo, la filo de homo, kiu estas en la ĉielo. 14. Kaj kiel Moseo levis Serponton en la dezerto, tiel devas la filo de homo esti levita : 15. por ke ĉiu

fidanta al li havu eternan vivon."

Per tiu eltiraĵo de la Biblio, oni povas kompreni, ke "denove naskiĝi" signifas "fidi je Kristo Jesuo agnoskante, ke li estas filo Dia". Kiel oni povas tiel fariĝi kristano? Necesas do konvertiĝo :

- rekoni, ke oni estas pekulo
- sekve konfesi kaj poste penti
- finfine observi la vortojn de Dio.

Kiu tiel agas, tiu fidas, kaj sekve havas eternan vivon. Kaj la "eterna vivo", kio ĝi estas? Ĉu temas pri surtera vivo, aŭ alia? Ĉu vivi sen morti? Ĉiuj, ankaŭ kristanoj, de kiu ajn aĝo, mortas ; eble alia vivo povas ekzisti por Kristofidantoj, ĉar kiuj (Duloj) mortas, tiuj devas atendi rekompencan, la eternan vivon. Kristanoj kredas je la vivo post la morto, tio estas, ke, se iu mortas, lia spirito postvivas. Do, la eternan vivon ĝuas nur spiritoj de mortintaj kristofidantoj. Do, kiu kristano naskiĝis denove, tiu havas tiun eternan vivon. Flanke de tiu vivo, kion signifas la feliĉa vivo de tiu, kiu pagane estas denove naskita?

"Naskiĝinte, oni devas denove naski sin, se oni volas ĝui feliĉan longan vivon", diras fetiĉanoj. En la mondpartoj, kie abundas idolanoj, la ne-idolanoj estas konsiderataj kiel sensubtenuloj. La plejparto da idolanoj devas draste riproĉi siajn kunulojn, konsilante ilin, esti denove naskitaj. La fetiĉoj estas por ili iaj ĉiopovaĵoj, kaj adorante ilin, oni povas havigi al si ĉion ajn, kion oni bezonas. Kiuj adoras tiujn diojn, tiuj estas denove naskitaj ; la dioj do protektas ilin senfine. Tiel, por esti pagane "naskita denove" oni devas

- adorkliniĝi al la fetiĉoj
- provizi sin per amuletoj kaj envultaĵoj ĉiaj.

Se DENOVA NASKIĜO Biblia signifas fido je Dio pere de Kristo Jesuo, tiu de la paganoj estas, ke oni devas provizi sin per fetiĉaĵoj ĉiaj kaj fidi al ili, kaj adorkliniĝi al idoloj. Dum la rezulto de unu estas "eterna vivo de antaŭ- ĝis postmorto", tiu de la alia estas feliĉa longa vivo sur la tero, antaŭmorta vivo. Ĉu ambaŭ DENOVE NASKIĜI garantias tiujn vivojn? Ĉu ambaŭ vivoj estas palpeblaj, viveblaj?

GBEGLO Koffi

KIAL ESTAS MILITOJ ?

Ĉiuj francaj pacistoj konas la frazon de Jaurès (Ĵores): "La kapitalismo portas en si la militon, kiel la nubego portas la ŝtormon". Tio estas nur parte vera, ĉar fakte ni ĉiuj scias, ke estis militoj longtempe antaŭ la kapitalisma sistemo, kiu komenciĝis antaŭ iom pli ol 200 jaroj. Antaŭe estis feŭdaj kaj sklavaj sistemoj ktp. Verŝajne ne ĉiam estis militoj, sed oni povas konsideri ke tio okazis de la tempo kiam la homoj estis sufiĉe multenombraj en iuj punktoj. La primitivaj triboj jam militis.

Do ni pripensu la temon "kial estas militoj", ĉar estas tre grave kompreni la verajn kaŭzojn de tiuj plagoj. Milito estas pure homa afero kaj nepre necesas la partopreno de homoj. La militmaŝinoj ne funkcias per si mem. De tia punkto oni komprenas, ke militoj devenas de la propra volo de homoj. Fakte ĉiu povas sperti, ke inter la homoj estas murdemuloj, murduloj. Mi ne diras, ke ĉiuj homoj estas murduloj, sed sufiĉas, ke estas nur 1% (sed la procento povas esti pli alta) por starigi jam belan armeon el loĝantaro de ekzemple 50 000 000. Mi ne diras ankaŭ ke en lando kiel Francio ĉiuj soldatoj estas latentaj krimuloj. Aliparte ne estas murduloj kaj nemurduloj : estas gradoj inter homoj kiuj havas nerezisteblan murdistinkton kaj veraj pacistoj. Unue, en Francio la militservo estas deviga, multaj soldatiĝas pro la devigo, aliaj ne pripensas la temon, ili estas senlaboruloj, aŭ mallaboremaj, aŭ senvoluloj, kaj ili soldatiĝas. Mi konis multajn eks-soldatojn profesiajn, kiuj estis nur ebruloj, kaj soldatiĝis sen pli pripensi. Sed en Francio estas deviga militservo de post la unua granda revolucio de 1789. Antaŭe ne estis deviga militservo, kaj tamen estis militoj. La viroj fariĝis soldatoj propravole, ĉu pro la samaj kaŭzoj supre menciitaj, ĉu ĉar ili estis veraj murduloj, kiuj ŝatis mortigi, detrui, perforti ktp. Pensu kiel bona afero estas milito por murdulo : oni povas mortigi kvazaŭ laŭvole, oni ricevas salajron, rekompencojn kaj honorajojn. Jean Rostand en "Pensoj de biologo", 1939, diris p.216 : "Oni mortigas unu homon : oni estas murdulo. Oni mortigas milionojn da homoj : oni estas konkerinto. Oni mortigas ĉiujn homojn : oni estas dio." Ĉu ne vere? Pensu pri la antikva

epoko, pri la duondioj aŭ herooj de la Grekoj...

Nun mondmilitoj kiel la unua kaj la dua ne plu eblus pro la atombomboj: tio signifus la morton de la homa speco kaj de multaj aliaj specoj. Tial ni havas la etnan naciismon kaj malgrandajn militojn. La naciaj armeoj estas reduktigantaj, sed la bandoj - tiel estas milicoj - multobligas: en Irlando, en Vaskio, en Korsikio kaj en aliaj lokoj.

En Libano ja tiaj milicoj interbatalis. Ofte estas nur milicetoj konsistantaj el teroristoj. Ĝenerale tiuj milicoj trovas monon por akiri armilojn, municiojn, kaj ĝuste kiam ili ne estas sufiĉe multaj kaj ne havas multe da mono, ili fariĝas teroristoj. La rendimento estas multe pli granda kun malmulte da mono. Je malsupera ŝtupo estas la ŝtonmilito kiel tiu de la Araboj en Izraelio. La celo estas ĉiam la sama: krei militkondiĉojn. La celo de la militistoj estas la milito. Tial oni vidas ekssoldatojn de iu armeo, kiuj fariĝas milicanoj en iu ajn lando kie estas milito, ekzemple Bob Denard kaj liaj samuloj en Afriko kaj Komoroj. Eĉ nun, en Jugoslavio, mi aŭdis ke estas eksterlandanoj batalantaj kun la Kroatoj. Se ni konsultas iun ajn publicaĵon pri ekonomio, ni vidas ke Jugoslavio estis en malbona ekonomia situacio, najbara al bankroto. Sed tamen en tia aĉa situacio Kroatio, (almenaŭ partoj de la Kroatoj, trovis monon kaj ne mankas armiloj. Aliflanke, ankaŭ al la jugoslava armeo kaj al la serbaj milicoj ne mankas armiloj. Kial la Kroatoj deziras sendependecon ĝis militi tiucele, verŝajne neniu povas diri. Estas tute nekompreneble. La komunismo en Jugoslavio estas tre libereca kaj konsentis multe da liberecoj al la liberaj ŝtatoj. En tiuj kondiĉoj, kial milito? Verŝajne ne estas raciaj klarigoj. Cetere, ĉu povas esti raciaj kaŭzoj aŭ motivoj al ia ajn milito?

Finfine la Historio estas cikla: unue, multaj triboj; unuj deziras kunigi sin sub sama potenco kaj poste la grandaj landoj disiĝas en multajn landetojn, ekzemple la roma imperio kaj ĝia dissplitiĝo, la hispana kolonia imperio, la brita kolonia imperio ktp., Sovetio kiu riskas fariĝi amaso da interbatalantaj landetoj en la du venontaj jaroj. Komprenu, ke la granda timo de Buŝ kaj de ĉiu klera homo, estas la ekapero de moderna Ĝenĝis

Ĥan kun atombomboj. Pensu pri Saddam Hussein.

La bazo de ĉio ĉi estas aro da murdemuloj, paranojuloj kaj aliaj frenezuloj. Tiam la granda amaso suferas pro malsato, mizero, ruinoj, morto. "Das ist Krieg, mein lieber Freund" (Tio estas milito, mia kara amiko). La monavido, la kapitalismo, la ideologioj, la religioj, tio estas flankaj fenomenoj, ĉu ne? Ĉion ĉi la fundintoj de S.A.T. bone komprenis, tial ili fundis SAT kaj kreis la koncepton de sennaciismo. Bedaŭrinde estas nun elvojiĝo: oni parolas en SAT pri etna naciismo, pri malkoloniigado, pri sendependeco de triboj ktp... sen konsideri ke tio estas bonaj motivoj por militetoj, kies rezultatoj estas samaj kiel tiuj de mondmilitoj, nur malpli ampleksaj. Konsideru nun la situacion de la ekskolonioj, de la ekskoloniitaj popoloj. Ne vidu la situacion elde la eŭropaj ĉefurboj, elde viaj fumaj teorioj, sed iru surloken, vidu, parolu kun la popoloj, unuvorte spertu kaj konkludu.

Certe en la estonteco oni scios kuraci tiujn murdulojn, same kiel la ŝtelistojn kaj aliajn malfeliĉulojn, fiulojn. Eĉ se necesus genetika manipulado... Sed pli verŝajne kemiaĵoj sufiĉos, ĉar la genoj agas tra biokeemiaj reagoj. Sed nun psikiatrio estas en infanaĝo, oni ekmalkovras la bazojn.

Fine, lasu min rememorigi al vi la refrenon de kanto, kiun ni, la tiamaj gejunuloj, kantis ĉirkaŭ la kampofajro en junulgastejoj, ĝuste en 1940:

*Tiom longe kiom estos militistoj
Ĉu cia filo, ĉu la mia,
Oni faros sur la tero nenion bonan.
Oni cin mortigos por cin silentigi
De malantaŭe kaj kiel hundo
Kaj ĉio ĉi por nenio (dufoje).*

J. DEKER



ALDONENDAJ ESPRIMOJ (kompilis: Lucien BOURGOIS)

- 464 (cloué au lit) - après "katenita" ajouter : alnajlita
 cloué au sol : alnajlita al la grundo
- 466 (clouer au pilori) - après "alligi", ajouter : (fiksi)
- 470 (je l'ai sur le coeur) remplacer "tio premas mian koron" par : mi sentas rankoron
- 485 (le coeur serré) ajouter : korpremite
- coins et recoins (les) - la vojoj kaj rojoj
- 495 (combler de bienfaits) - ajouter : surverŝi K
 comme à plaisir : same kiel intence
 comme par enchantement : kvazaŭ per sorĉo
 comme par magie : kvazaŭ magie
- 498 (faire le commerce de ses charmes) - ajouter : amorvendi
- 500 (d'un commun accord) - ajouter : per komuna akordiĝo, sendispute
 comme un seul homme - kvazaŭ unu homo B, kvazaŭ unu viro B
- 501 (le commun des mortels) - ajouter : la maleminentuloj
 compagnons d'armes (des) - voir : 1239
 compagnons d'infortune (des) - sammalfeliĉuloj
 connaître toutes les ficelles du métier : koni ĉiujn fajnojn en la medio
 conquête de quelqu'un (faire la) - plenakiri iun
- 535 (à contre-coeur) - ajouter : de mauvaise grâce + malvole, malvolonte, nevolonte Z
 contre toute attente : kontraŭ ĉia atendo Z
 contre vents et marées : kontraŭ muroj kaj maroj
- 539 (copains comme cochons) - ajouter : intimuloj kiel paro da muloj
- 540 (comme un coq en pâte) : dorlotata kiel sanktul' petata
 (être comme un coq en pâte) - ajouter : esti kiel azeno en luzerno
- coucher (être) sur la paille, être sans ressources - voir : 2191
- 560 (se la couler douce) - ajouter : vivi trankvile kaj agrable
 - il se la coule douce : li estas feliĉulo kiel hundo sen pulo
- 566 (avoir le coup de foudre) - ajouter : eksenti fulmobatan enamiĝon
 coup d'épée dans l'eau (un) - batado de la vento
 coup sur coup : tuj refoje kaj refoje
- 606 : voir 1405
- 609 (courir à sa perte) - ajouter : kuri al sia perejo
 courir comme une gazelle : kuri kiel gazelo
- cours (avoir) - monnaie : esti uzebla
 cours (être en) :) : esti farata
 cours de ... (au) : en la daŭro de ... Z
 cours terme (à) : mallongtempa
- 633 (couvrir de boue) - avant "supersuti", ajouter : superĵetadi Z
- 649 voir : 388
 crier famine : vei pro malsato

Nia kara majstro, d-ro Lazaro Ludoviko ZAMENHOFO, ekde la komenco, starigis por Esperanto la principon de internacieco, enkondukante tial la plej vaste konatajn vort-radikojn.

Sed bedaŭrinde, dum ĉi lastaj jaroj, la malamikoj de la Interreta Lingvo, kun nelacigebla k-insida persisto, pluaperigadas Esperantalajn aŭ pseudo-Esperantajn duoblaĵojn, tiel kreante konfuzan haŭson en niaj vicoj!

Nepre necesas do rifuzi kaj elimini tiajn formojn, kiuj malsimpligas, kaj duobligas la lernotajn vortostokojn de nia lingvo. Ekzemple:

En ESPERANTO aŭ trafe! En Esperantalo aŭ maltrafe!

Bilbao	Bilbo-ko!
Birmo	Mjamaro
-loĝanto: birmano-	(Ĉia maro?)
Brazilo	Braziljo (lando)
Brazilja	Brazilio (urbo)
Cejlono	Cejlanko/Sriklono!
Ĉilo	Ĉiljo/Ĉilio
Finlando	Sunomio
Ganao	Gano/Ganjo
Hindio (Vidu PIVon!)	Baratio/Barato (reĝo!)
Holando (lando, ne tero!)	Ne-ter-lando
Koreo/koreano	Koretio/koreto (loĝanto kun eta koro!)
Ukrajnio	(l')Ukra-ino (=akre-lukra-ino!)
Vaskio	Eŭskadio
-loĝanto: vasko-	(k)Eŭskadiablo!
	eŭskado

Necesas ankaŭ rifuzi ĉispecajn strangaĵojn: SPONZORO (patrono), BRISKA (freŝa), KLAMO (krio) Por KLAMO jen la ĝusta difino: duvalva molusko; angle: clam; hispane: almeja (marina); france: clovisse (de mer).

Ĉi kion fari? Enkaĉigantoj nevole enkaĉigigas aŭ enkaĉigigas kaj ne povas eliri el tiu speco de kaĝo, kaĝolo aŭ gaĝolo reprezentata de la Esperantala araneaĵo. Ili re-klame re-sponzoras, anstataŭ dece-respondece agi!

Ĉe unua renkontiĝo, paro da cicindeloj senĝene aldiris: ci-cin!, unu la alian! Kaj paro da cecemuŝoj simile ce-ceis! Ĉi kion fari? Ili estu feliciaj kun siaj cioj kaj siaj ceoj!

Ĉu vi ŝatas rokanrol-muzikon? Jes, sed multe pli, ŝtonmuzikon kaj granit-muzikon, ĉar mi estas eŭrokanrolano kaj vendisto de rokoj!

Nu, ŝajne la vivo enhavas entenojn (aŭ antenojn!) entinigitajn!

(En LAŬTE! 97, p. 45^a) Laŭ DEKERO, francoj preferas Mitantan ranon anstataŭ ĉi rakon! E-a nomo devas lokiĝi antaŭ tiu nacilingva!!! Miterano (=Mitterrand); Sirako (=Chirac); E-aj publikaĵoj ja ne devas esti katedroj de nacilingvaj prononcadoj!

Kaj por fini, el la flakoj nun aŭdiĝas ranaj kvakoj... kvak', kvak', kvak', kvak-eroj sen klerigaj klerik-eroj!

ERGOTO DE BONAERO

RECENZO

LA ARMEE DE HIROHITO : notoj de japanaj milit-krimuloj ; eldonis Biblioteko Kolombo, ĉe Tanaka Takayuki, 24 Simogawara, Numazu Sizuoka-ken, 411 Japanio (1990, 200 paĝoj).

La deveno de tiu libro postulas klarigon : dum la dua mondmilito Japanio subpremegis la ĉinojn en Manĉurio. La Kunliga Societo de Revenintoj el Ĉinio kompilis tiujn ĉi notojn. Tiujn prezentis Osaka Porpaca Ekspozicio pri Milito kaj poste eldonis ilin la Japana Demokrata Organ-Eldona Centro ; fine mortis la Imperiestro kaj kelkaj japanaj Esp-aj pacdefenduloj altradukis la 14 raportojn.

Ĉiu atestaĵo indikas sian aŭtoron, lian taĉmenton, la precizan lokon, kie okazis la abomenaĵoj. La milit-krimuloj poste estos tenitaj de la ĉinoj, kiuj ilin liberigis en 1956. Sovetio forpuŝos la japanojn el Manĉurio kaj transdonos la manuskriptojn al Ĉinio. Ĉu tiuj ĉi skribaĵoj estis truditaj? Verŝajne ne, ĉar en 1988, la aŭtoroj vivas libere en Japanio kaj povus nei siajn dirojn anstataŭ penti.

Kion nu enhavas tiuj tekstoj? Raportojn malmildajn pri agadaĉoj de la japanaj militistoj, kiuj estis ofte volontuloj : ŝteloj de

vestoj, deviga laboro, ĉiaj bataj kaj torturadoj, perfortoj al virinoj, perglavaj koltranĉadoj... En preskaŭ ĉiu rakonto kontraŭas la akra rigardo de la mortonta terkulturisto kaj la akra pinto de la glavo.

La sentemuloj ne eltenos la legaĵon de tiuj abomenaĵoj. La stilo estas rekta, la lingvo riĉa kaj bone kontrolita. Nur nemultaj kuriozaĵoj aperas : ekz. verboj kontraŭe al PIV transitivas : "nin fulmis rigardo" (p.73) kaj "ne ŝercu min" (p.95).

Krampete jen du rimarkoj amuzaj... nur por E-istoj : torturintojn ofte helpis interpretistoj por demandi la viktimojn. Due la Sovetianoj, kiuj forpelas fine la Japanojn, estas "sennaciecaj"; sed kion signifas tiu tre lakona indiko?

Aliaj enigmoj ne mankas : kiel estis traktataj la japanaj kaptitoj tenitaj ĝis 1956? Kiel la Ĉinoj ilin reedukadis? Ĉu iliaj postaj pentoj estas sinceraj?

Grava problemo estas la partigo de la respondecoj inter Hirohito kaj liaj divers-rangaj regatoj. Tiam temon devus lumigi la du apendicoj de la libro :

- la unua enhavas la 76 artikolojn de la imperia konstitucio, kiu validis de 1889 ĝis 1947. Sed nenia komento! Ŝajnas dividita la potenco inter la "sankta kaj netuŝebla" Imperiestro, la duobla Dieto, la Kortega Konsilio kaj la Registaro.

- la dua aldono estas la imperiestra instrukcio al la militistoj. Ĝi memorigas, ke de 2500 jaroj la Estro de la Ĉiela Imperio mem komandis la armeon. La soldatoj devas esti lojalaj, decaj, bravaj, fidelaj kaj modestaj. Sed ĉu sovaĝaj aŭ ne? Neniu frazo instigas al krueleco, sed la imperia aŭtoritato ĉiam akcentatas.

Resume tiu ĉi raporto estas severa dokumento pri la "japanaj ogroj" kaj iliaj abomenaĵoj en nord-orienta Ĉinio. Dubo restas pri la respondeco de tiuj krimoj : ĉu deziro de rang-altiĝo fare de la soldatoj, ĉu fera mano de Hirohito?

Recenzis Jacques Caubel, Francio.

ROK-GAZET'

Aperis la 3a n-ro! Belege presita, abunde ilustrita... Tial luksa eldonaĵo vere eksterordinaras en la E-mondo! Ve, estas elspezoj, kiujn povas kompensi nur sufiĉa eldonkvanto. Tial ROK-GAZET' petas ĉies subtenon. La abonkosto estas

26 irpk, 100 FF, 35 NLG, 20 USD por pagipovaj landoj ;
13 USD aŭ 18 irpk por la nepagipovaj. Adreso :
EUROKKA, F 31450 DONNEVILLE. (UEA-kodo: Rokk-b)

LEĜPROpono POR UNUFLANKA MALARMIGO DE FRANcIO



Antaŭ kelkaj jaroj starigis komitato por prezenti tian leĝproponon al la Parlamento de Francio. Malaperis multaj el la komitatanoj, kaj precipe la fama iniciatinto Louis LECOIN, sed jen, persisteme, ĝis la efektivigo de la afero, nova komitato kaj la Pacista Unio de Francio denove kampanjas por tiu idealo, la nura racia solvo al la milit-problemo.

La "prezentado de la motivoj" estas aktualigita, koncizigita, sed la teksto mem de la leĝpropono restas sensanĝa. (Laŭte! siatempe aperigis ĝian E-tradukon).

Nepre subtenu tiun home indan kampanjon, helpu por diskonigi la dokumentojn kaj konvinki pri la neceso de tia epokfara ekpaŝo!

Ekriklatu kun la respondeculino, laŭtulino, F. MARTINEZ, tel.(1) 46 70 00 26. Monhelpu al : U.P.F.

4 rue Lazare-Hoche, 92100 BOULOGNE.

Poŝtkonto : 3 964-01 B Paris.

LETERETO EL LA MUELEJO

Post kvinmonata restado en hospitalo, Solanĝa revenis hejmen definitive. Ŝi kapablas iom marŝi per lambastonoj. Espereble, ŝi iam ne plu bezonos ilin. Sed ŝi restos lama, ĉar la dekstra genuo ne retrovos flekseblecon.

Pro tiuj cirkonstancoj, kaj ankaŭ pro la malfacilo veturi aŭte por aĉetoj en la ĉefurbo, ni preferas ne inviti por renkontigoj en la muelejo ĉi-somere.

Kristiano.

Peras por L! en Baltaj landoj :

V. Baniulaitis, ab.d.168, 5800 KLAIPEDA, Lituanio.

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville. CPPAP 58651.